# KOMUNIKOJ

TRIMONATA BULTENO DE SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ
Jaro 40-a BRAZI LO, JANUARO-FEBRUARO-MARTO 2016 2016 N-ro 161

"Amu vian Dion per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj vian proksimulon kiel vin mem."
JESUO (*Mt*, 22:37-40).

"Neskuebla fido estas nur tiu, kiu povas rekte rigardi la racion en ĉiuj aĝoj de la homaro."
KARDEC. *La Evangelio laŭ Spiritismo.* Ĉap. 19, §7.

"Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian."
ZAMENHOF. *La Espero.*

## Historia kaj Sukcesplena Renkontiĝo

Unuafoje en la historio kunvenis sukcesplene la Patriarko de Moskvo kaj de la tuta Rusio, Lia Papa Moŝto, Cirilo la Unua kaj la Sankta Papo Francisko, la Episkopo de Romo, ene de la havana internacia flughaveno "José Martí" dum du horoj.

Neniam antaŭe tiu renkontiĝo okazis inter du Kristanaj Eklezistroj: la romkatolika kaj la ortodoksa rusa. Ili subskribis komunan deklaron pri la paco kaj ilia kunlaboro.


Havano tre sentis sin honorata helpi tiun intereklezian kontakton.

(Informoj de Juan Carlos Montero Medina, el Kubo)





## Almanako Lorenz 2016




Lanĉota en la 101-a Universala Kongreso en Nitro, Slovakio.

Pluraj verkistoj, el diversaj landoj, partoprenas la Almanakon de la Jubileo, kaj ĝin omaĝas okaze de la 40 jaroj da laborado de la Asocio Lorenz por la paco kaj frateco, kiel ĉiam revis la majstro Zamenhof.
Almanako estas la unika en la esperantismo. Ĝi pritraktas ĉiujn temojn, kiuj interesas la modernan homon laŭ la spirita kaj kultura vidpunktoj, kaj ĝi ampleksas vastan kampon de la filozofio, de la scienco kaj de la religio.

**Petu tuj la vian!**

# AMIKOJ DE LORENZ



Eldonejo Lorenz havas grandan ĝojon omaĝi la polan esperantiston, profesoron, verkiston, amikon de Lorenz, Przemysław Grzybowski, vera homarano! Dankon, kara Amiko!

"Laŭ la antikva ĉina proverbo: donacante libron, oni donacas animon. Ĉiu libro enhavas unikajn ideojn, vortojn, frazojn... kiuj kapablas transformi pensmanieron de leganto, riĉigi lian sperton kaj eble influi lian vivon. Ricevante librojn de Asocio Lorenz, mi plurfoje ricevadis "novajn animojn", kiuj inspiradis min, vekis mian intereson pri universalaj kulturaj valoroj. Mi eĉ povus diri, ke la libroj multe influis mian spiritan maturiĝon, kio permesis al mi dividi la trovitajn en ili trezorojn kun geamikoj, gelernantoj kaj legantoj de "Almanako Lorenz". Estis, estas kaj esperebIe estos por mi honoro kunlaboradi en la nobla verko de la Asocio. Okaze de la Jubileo, mi esprimas mian dankon pro ĉio kaj deziras al ĝia estraro kaj membroj fruktodonan kontakton kun libroj – ĉu kiel eldonantoj, ĉu kiel legantoj, ĉar mi estas certa, ke iel ajn funkcios la mirinda, unika interŝanĝo de animoj danke al la eldona kaj populariga agado inspirita de la nobla spirito Francisco Valdomiro Lorenz".

Przemysław Grzybowski
El Almanako Lorenz 2017

# Libro de F. V. Lorenz en 7 Idiomoj!




La Spirito Lorenz, per la mediumeco de Francisco Cândido Xavier, verkis belan mesaĝon pri la graveco de Esperanto ankaŭ en la spirita mondo. Ĉi-mesaĝon eldonejo Lorenz tradukis en 7 idiomojn kaj organizis mirindan verkon: "Esperanto kiel Revelacio". La idiomoj estas: esperanta, angla, franca, hispana, germana, itala kaj portugala.

Inter la tradukistoj kaj reviziistoj estas Renato Corsetti, Trevor Steele, Porto Carreiro Neto, Affonso Soares, Benedicto Silva, Ursula kaj Giuseppe Grattappaglia, Jader Rodrigues da Silva, inter aliaj kompetentaj geamikoj.

Ne perdu tempon kaj petu informojn pri ĉi-grava verko:

**editora_lorenz@uol.com.br**



**KUNLABORU!** – Membriĝu ĉe ASOCIO LORENZ kaj helpu la disvastigon de Esperanto kaj Spiritismo en la tuta mondo!

***COLABORE!*** *– Torne-se membro da ASSOCIAÇÃO LORENZ e auxilie a divulgação do Esperanto e do Espiritismo em todo o mundo!*

LORENZ

**"KOMUNIKOJ"**

TRIMONATA BULTENO DE LORENZ – SPIRITISMA ELDONA ASOCIO F. V. LORENZ

Fondita la 15-an de decembro 1975

Jaro 40-a – n-ro 161 – Januaro-Februaro-Marto 2016

Interreta kaj papera senpagaj eldonoj
Ĉirkaŭ dudek mil legantoj en la tuta mondo


**KONTAKTIĜU KUN NI KAJ ALIĜU:**

Spiritisma Eldona Asocio F. V. Lorenz
Rua Francisco Vale, 57 Engenheiro Leal
21370-171 Rio de Janeiro-RJ – Brasil (Brazilo)
Telefonoj: + **55-21-2221-2269** - + **55-21-2450-4768**
Skajpo: **Lorenz Editora** | Fejsbuko: **Editora Lorenz** | Retadreso: **editora_lorenz@uol.com.br**
Retpaĝo: **http://editoralorenz.blogspot.com.br**




Kompostita de Rogério Mota

# Kuriozaĵoj el la leteroj de Zamenhof



Al Majnov, 2 (14)* X. 1887

Estimata sinjoro!

Respondon je via demando kaj konsilo vi trovos en la verketo "Respondoj al la societo", kiu estos eldonita post 4-5 semajnoj. Je ĉiu okazo mi dankas vin kore por via bona volo.

Kun estimo Esperanto

* la duobla dato laŭ la julia gregoria kalendarstiloj.

Al Majnov, 5 (17) X. 1887

Estimata Sinjoro!

Respondante vian leteron, mi povas vin sciigi, ke la ĵurnalo komencos eliri kredeble ĉirkaŭ la monato Januaro kaj Februaro de la jaro 1888, sed certe diri mi ankoraŭ ne povas, ĉar mi ankoraŭ devas nun labori ke la registaro donu al mi la permeson.

La plena vortaro jam estas preta, sed ĝi eliros kredeble ne tiel baldaŭ. Kiam la gazeto komencos eliri, mi donos en ĝi respondojn de ĉiuj demandoj de la legantoj; en tiu gazeto estos priparolata ĉio, kio estas necesa por la lingvo internacia*.

* ĉi tiu kaj la antaŭa letero al majnov estas skribitaj kun streketoj, kiuj disigas la vortelementojn.

Al Majnov, 11. V. 1889

Estimata amiko!

Mi kore vin dankas por via lasta letero kaj por la esperoj esprimitaj en ĝi. Se ĝi prosperos al vi ebligi al mi la eldonadon de gazeto, tiam ĝi estos tre grava por nia afero, ĉar mi tiam havos la eblon regule labori por ĝi. Kune kun tiu ĉi letereto mi aldonas al vi alian leteron, skribite rusen, kiun vi povas montri al la granda princo. La letero estas skribita kiel letero privata al vi. Pri la granda princo mi skribis "nekonata de mi persono", ĉar estos multe pli bone, se la princo ne scios ke vi jam skribis al mi pri li; al la princo vi devas diri, ke mi ne scias ankoraŭ kiu estas la persono de kiu vi atendas helpon; ke vi skribis al mi nur ke de "unu granda persono" vi atendas helpon (li povas koleri se li sciiĝus, ke vi enmiksas lian nomon ankoraŭ antaŭ ol li efektive promesis sian helpon) Kun senpacienco mi atendas jam la rezultaton de via penado.


## ESPERANTO-KURSOJ

**LA FRANCA ESPERANTO-KASTELO GRÉSILLON INVITAS VIN LERNI KAJ FERII**

**2016-apr-08/16: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1) - http://gresillon.org/printempas**

**2016-apr-20/24: Korusa renkonto de Interkant' kaj verkadaliero Krajon'-Ankro - http://gresillon.org/koruso**

**2016-jun-12/17: La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj - http://gresillon.org/s1**

**2016-jul-04/15: Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto - http://gresillon.org/s2**

**2016-aŭg-06/13: SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO - http://gresillon.org/s3**

**2016-aŭg-21/28: Festa semanjo por infanoj, adoleskantoj kaj familioj - http://gresillon.org/s4**

**Kontakto: kastelo@gresillon.org,**

**+33-2.41.89.10.34, http://gresillon.org/kontakto**


## Nova Filmeto pri Ĉeĥio Esperante Dublita

La ĉeĥa urbo Ústí nad Orlicí, situanta en Regiono Pardubice, estis inter la 6– kaj la 8-a de novembro 2015 okazloko kaj financa subtenanto de la Anstataŭa 15-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ni ofertas al vi nun mallongan filman viziton de la urbo kaj de ĝiaj vidindaĵoj.

Por vidi la filmon iru al:
**http://www.ipernity.com/doc/181031/41063130**

# 17 JAROJ DE SENPAGA ESPERANTO-KURSO ĈE AAP-VR

Antaŭ 17 jaroj (16ª/Julio/1999), invitita de la Estraro de AAP-VR (Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj de la urbo Volta Redonda – ŝtato Rio-de-Ĵanejro – Brazilo) mi iniciatis la 1ªn senpagan Esperanto-kurson ĉe tiu Asocio (40.000 asocianoj). La E-kurso estis malfermita al ĉiuj asocianoj, iliaj familianoj kaj al iu ajn persono kiu interesiĝus pri La afero. Ĉi tiu kurso, ĉiujare, rekomenciĝas kaj finiĝas kun bonaj rezultoj. Ĝi daŭras 7 monatojn. Nun (2016) estas la 17-a jaro en kiu grupo da gelernantoj, junaj kaj maljunaj, diligente lernas la lingvon ĉe "Centro por Antaŭzorgo pri La Sano de Gemaljunuloj" de AAP-VP, strato 535, numero 890, urbo Volta Redonda – RĴ – Brazilo.

La leciono okazas ĉiam en larĝa kaj konforta lernĉambro, kun bona lumigado kaj aerumado, ekipita per seĝoj kies brakoj formas malgrandan skribtablon; tio faciligas al la gelernantoj skribi sen malfacilaĵoj. La ĉambro havas ankaŭ instalaĵojn por prezentadoj de vidbendoj kaj aliaj lernigiloj. Granda blanka tabulo taŭgas por sur ĝi skribi per diverskoloraj skribiloj, kaj estas facile forviŝi la skribaĵojn, sen la malkonvenaj pulvoroj, kiuj formiĝas kiam oni skribaĵojn forviŝas de sur nigra tabulo skribita per kreto.

Ĉiu merkredo, Inĝ-ro Prof-ro Alberto Flores instruas Esperanton dum unu kaj duona horoj (de la 8h30 ĝis 10h) Je la 9h15. okazas mallonga paŭzo, por ke La gelernantoj trinku kafon aŭ teon, kun bongustaj biskvitoj.

Kvankam la lernantaro ne pagas matrikulon nek monatan kotizon, ili devas aĉeti la libron de apogo. Ili vere interesiĝas pri La lecionoj, ĉar ili rekonas ke La Esperanto-lernado estas bonega okupoterapio, kiu bone ebligas lerni la lingvon Esperanto, por legi revuojn kaj la riĉan literaturon kiun oni trovas en la internacia lingvo. Ankaŭ al ili interesas partopreni en esperantistaj kunvenoj, kongresoj kaj renkontiĝoj, kaj havi kontakton kun gesamideanoj de aliaj landoj, per leteroj aŭ per Interreto. Ili rekonas ke Esperanto estas tre bona okupoterapio, kaj sentas sin feliĉaj, ĉar ili havas oportunon koni aliajn personojn, trovi novajn amikojn kaj plivastigi sian kulturon kaj konojn. Ili opinias ke valoras la penon lerni Esperanton kaj ankaŭ asertas ke nenia persono bedaŭros sin dediĉi al tiu afero! ★




Disdonado de atestoj al gelernintoj de la 17-a Baza Kurso de Esperanto, okazinta en Volta Redonda – RĴ, 2015.
Instruisto: Alberto Flores

# LANĈO

Pli ol 100 homoj ĉeestis la lanĉon de la libro, en la portugala lingvo, de Brunilde Mendes do Espírito Santo:

***Madre Teresa de Calcutá***




La preleganto, Profesoro Cesar Soares dos Reis, prezentis detalojn pri la vivo kaj verko de tiu nobla animo. Tuj post la prelego, la aŭtorino aŭtografis sian belan verkon.

Ĉi-libro estas la tria de la serio "Herooj de la Homaro". La unua estis "**ALBERT SCHWEITZER**", la dua, "**MARIE CURIE**", kaj la kvara, "**PESTALOZZI**", eble eldonota de Eldonejo Lorenz en majo.

Ni pliantentigas, ke s-ino Brunilde havas 94 jarojn kaj jam verkis pli ol 16 librojn! Kia bela ekzemplo!

## Senpagaj Libroj...

Ĉiuj kiuj loĝas ekster Brazilo rajtas ricevi niajn librojn, en Esperanto, tute senpage. Sufiĉas nur sendi al ni vian kompletan nomon kaj poŝtadreson al **editora_lorenz@uol.com.br**






# 68-a Kongreso de IFEF en Varna (Bulgario)

Temoj de la kongreso: " La fervojo de la estonteco" kaj "La lingvo kiel rimedo por interkomunikado".

La ĉi jara kongreso de la fervojisto okazos en Varna ekde la 21-a ĝis la 28-a de majo 2016.

Ĝi estos vera internacia renkontiĝo je homa mezuro, la nombro de la partoprenantoj estas sufiĉe (150) kaj el diversaj landoj ke oni povas trankvile ĝuii la etoson kaj la geamikojn.

La programo enhavas prelegojn, fakajn kaj ne, amuzajn vesperojn, ekskursojn por koni la teritorion kaj la kulturon de la loĝantaro.

Ĝi estas fervojista kongreso, sed ĉiuj esperantistoj kaj simpatiantoj de fervojistoj estos bonvenaj.

Por pluraj informoj kaj aliĝilo vizitu la paĝaron: **www.ifef.net**

# Nask kaj Kino-Teatro-Festo denove kune!

La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) ankaŭ ĉi-jare kunigas la fortojn kun Kino-Teatro-Festo kaj invitas vin al unu el la plej elstaraj eventoj en Esperantujo! NASK – la plej longdaŭra Esperanto-kursaro en Norda Ameriko – estas unu el la plej gravaj aktivaĵoj subtenataj de ESF. Ĝi estas unika kleriga evento, kiu altiras lernantojn de ĉiuj lingvoniveloj kaj elstarajn Esperanto-instruistojn el la tuta mondo.

La kursaro en 2016, jam la trian fojon, estos sur la bela verda kampuso de la universitato William Peace en Raleigh, Nord-Karolino. Same kiel en 2015, Kino-Teatro-Festo (KTF) okazos samtempe kun NASK, tiel ke la partoprenantoj de ambaŭ eventoj povu partopreni en la komunaj aktivaĵoj kaj vidi la finan produkton de la metiejoj de KTF. La plena programo okazos inter la 28-a de junio kaj 7-a de julio kaj la mallonga programo inter la 28-a de junio kaj 3-a de julio. Estos ankaŭ diversaj aliaj aktivecoj: esplorado de muzeoj, butikoj kaj restoracioj de la urbo, ĉio en piedira distanco de la kampuso. Ambaŭ grupoj povos partopreni la feston de la 4-a de julio, kun piroteknikaĵoj!

Ĉiun jaron oni petas al famaj instruistoj kaj movadanoj el la tuta mondo instrui ĉe NASK, kaj ankaŭ en 2016 ni ĝojas anonci la stelan instruistan teamon! La superan kurson gvidos Bertilo Wennergren, membro de la Akademio de Esperanto, la Esperantisto de la Jaro 2006, muzikisto kaj la aŭtoro de la "Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko", "Detala Gramatiko de Esperanto" kaj "Landoj kaj Lingvoj de la Mondo". Tim Morley estos la instruisto de la meznivela kurso.

**NASK-2016: 28a de Junio – 7a de Julio en Raleigh, Norda Karolino**




Diplomita instruisto de la angla, Tim, interalie, gvidis esperantigon de OpenOffice kaj instruas la lingvon interrete pere de italki.com (lastatempe, lia priesperantuja adaptaĵo de la fifama kartludo Cards Against Humanity furoris en diversaj Esperanto-aranĝoj en Eŭropo). Ĵenja Bondelid ("Helena" el la videokurso Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo) gvidos la komencintan kurson. Fondinto de la Kino-Teatro-Festo, Ĵenja diplomiĝis pri la instruado de Esperanto ĉe la altlernejo Principia; ŝi reĝisoras, danckomponas kaj prezentas sur loka scenejo en Vaŝingtonio. Lee Miller, profesia interpretisto de la Usona Signo-Lingvo, gvidos la postbazan kurson (Lee estas partoprenanto de la kursaro ekde 2000 kaj nun li estas jam delonge unu el ĝiaj gvidantoj). Hoss Firooznia, la redaktoro de Usona Esperantisto, estos helpinstruisto kaj redaktoro de "La NASKa Fasko" kaj gvidos eksterkursajn programojn.

Vizitu la retejon http://nask.esperantic.org por pli da informoj pri NASK kaj www.kotofesto.org pri KTF. La aliĝilo estas havebla laŭ peto al la administranto de la kurso, Ellen Eddy, ĉe EDDYELLEN@aol.com.

Kino-Teatro-Festivalo



***"Tiamaniere, ni, spiritualistoj kaj spiritistoj, enkarniĝintoj kaj elkarniĝintoj, atentu la pligrandiĝon de Esperanto, samtempe klopodante por la restarigo de la kolumnoj de Kristanismo kiel vivanta sanktejo de la Universala Religio, sur bazoj de amo kaj saĝo, sur la tereno de la Nemezurebla Boneco de Dio kaj ties ĉiama Justeco."***

(XAVIER, Francisco Cândido (F. V. Lorenz, spirito). *Esperanto kiel revelacio*. Rio de Janeiro: Lorenz, 2015. p. 16-17.)